

Terminologia Forumo UK 2011

vendrede, la 29-an de julio, 13:00-16:00

La Terminologia Forumo, ĉi-jare kun ĉeftemo "La faka lingvo en la interreto", havas la celon prezenti novajn ekonojn, novajn aspektojn kaj novaj atingojn en la kampo de la faklingva agado en Esperanto (novaj faklingvaj vortaroj, problemoj de la terminologio kaj terminografio, apliko de ISO-normoj, apliko de la interreto kaj de aliaj elektronikaj instrumentoj ktp.).

Ĉiu prelego daŭras 20 minutojn, sekvata de 10-minuta diskuto. La lasta transiras en ĝeneralan diskuton kaj planadon de nova agado. Respondecas Marek BLAHUŠ, K.N. 863, estrarano de E@I. La diskuton gvidos Mélanie MARADAN, K.N. 1283, komisiito de UEA pri rilatoj kun Infoterm kaj ISO.

PRELEGOJ

Mélanie Maradan

Terminologia normigado kadre de la terminologia komitato TC 37 de ISO

Faka komunikado sukcese okazas nur pere de terminoj (fakaj esprimoj), pri kiuj oni devas internacie konsenti. Samtempe normigindas la nocioj, kiujn oni celas pere de tiuj terminoj. Surbaze de verko de Esperantisto kreiĝis en 1936 tutmonda teknika komitato pri terminologio, nun nomita ISO/TC 37 (teknika komitato 37 de la Internacia organizaĵo por normigado). En la prelego montriĝos la ekesto de la komitato, ĝiaj nunaj taskoj kaj la oficialaj laborrilatoj de UEA kun ĝi.

Mélanie Maradan estas svisa tradukistino-terminologiisto. Magistre diplomita de la Universitato de Genevo, ŝi laboris en la Centra oficejo de la Internacia organizaĵo por normigado (ISO), en svisa federacia oficejo pri medio kaj plu laboras en privata germana firmao en la kampoj de terminologio kaj faka tradukado. Ŝi elektiĝis en la printempo 2011 kiel UEA-komisiito pri rilatoj al Internacia informejo por terminologio (Infoterm) kaj al la teknika komitato de ISO pri terminologio (ISO/TC 37).

P-ro Christer Kiselman

Streĉiteco inter planlingvo kaj ĉiutage parolata lingvo Spertoj el la Sekcio pri faka lingvo de la Akademio de Esperanto

Esperanto estas la lingvo kiun parolas la esperantoparolantoj. Jen cirkla (kaj tial science neakceptebla) difino, kiu tamen esprimas gravan ideon pri la identeco de la lingvo. Kaj kompreneble ĉiu lingvo estas analoge difinita.

La esploristoj pri la kantado de la ĝiba baleno (megaptero ĝibdorsa, *Megaptera novaeangliae*) registras kaj analizas la kantadon el la oceana profundo, sed ili ne serĉas (sekve ne trovas) erarojn en la balena kantado. Lingvosciencistoj penetras la ĝangalojn de Amazonio kaj priskribas lingvon parolatan de nur okdek tri personoj sen trovi en ilia lingvaĵo erarojn. Ni komprenas ke la nocio de lingva eraro estas io kio povas ekzisti nur en sufiĉe grandaj lingvokomunumoj, nome nur en tiuj kiuj kapablas vivteni gramatikistojn, vortaristojn, lingvoplanistojn, akademianojn kaj simile funkciantajn homojn. Nur en tiuj komunumoj aperas la nocioj de lingva normo kaj de lingva eraro -- kiuj tamen estas gravaj en ĉiu lingvo kiu devas funkcii ne nur en unu loko kaj en unu momento. Sen normigo ĉiu lingvo restus tre limigita space kaj tempe.

Por esperanto ekzistas gvida dokumento: la *Fundamento de Esperanto* el 1905, kiu peras ian juran difinon. En la prelego mi prilumos, surbaze de spertoj en la Sekcio pri faka lingvo de la Akademio de Esperanto, la streĉitecon inter unuflanke la emo elcentre stiri kaj aliflanke ĉies emo evoluigi parolaton lingvon.

Christer Kiselman estas matematikisto kaj laboris pri partaj diferencialaj ekvacioj, kompleksa analitiko kaj geometrio en pluraj variabloj, kaj pri analitiko en spacoj kun nefinia dimensio. Nuntempe li ĉefe esploras pri digita geometrio, matematika morfologio kaj diskreta optimumado. Li verkis pri la gramatiko de esperanto, pri la frua historio de la lingvo kaj pri la religiaj ideoj de Zamenhof. Li membras en la Akademio de Esperanto ekde 1989 kaj estas direktoro de ties Sekcio pri faka lingvo ekde 2010. Li redaktas la revuon Esperantologio / Esperanto Studies (kvin kajeroj 1999--2011).

Li respondecis kune kun H. S. Holdgrün pri la matematikaj terminoj kaj kune kun Ingemar Kaj pri la statistikaj terminoj en NPIV (2002). Li publikigis kune kun Lars Mouwitz svedlingvan matematikan terminaron (2008), 312 pp. Retpaĝaro ĉe www2.math.uu.se/~kiselman

P-ro Amri Wandel
Kiel gugli por trovi vian blogon

Iom post iom ni ĉiuj cedas al la novaj tendencoj de la interreta mondo. Kun ili venas novaj terminoj, kiel Google, Facebook, blog... La aktiva Esperanta retkomunumo (proporcie al la "malreta" mondo, ĝi verŝajne estas pli aktiva ol la "papera" E-komunumo) bezonas kaj rapide inventas kaj ekuzas la bezonatajn terminojn en Esperanto - tiel ekzemple en la lastaj jaroj aperis kaj ekradikiĝis "gugli" kaj "blogo". Ĉu ili ne meritas seriozan diskuton ne nur interne de la retaj grupoj sed ankaŭ en pri tradiciaj institucioj kiel la Akademio de Esperanto?

Amri Wandel estas membro de la Akademio de Esperanto, profesoro pri astrofiziko ĉe la Universitato de Jerusalemo, Israelo, kaj gastprofesoro en la Universitato de Kalifornio en Los-Anĝeleso, Usono. Li estas estrarano de UEA pri scienca kaj faka agado (1995–1998, 2004–2007 kaj ekde 2010), sekretario de la Internacia Kongresa Universitato, prezidanto de Esperanto-Ligo en Israelo kaj redaktoro de Israela Esperantisto.

D-ro Eckhard Bick
Tradukcela terminologio - terminologiaj aspektoj de la WikiTrans-projekto

En la kazo de Esperanto, terminologia laboro ofte havas du- aŭ plurlingvan bazon - unue, ĉar faras ĝin vortaristoj aŭ individuoj pli ofte ol fakaj grupoj kaj konferencoj, due ĉar apenaŭ ekzistas fakaj medioj kie la ĉiutaga aŭ publikiga laborlingvo estas Esperanto. En mia kontribuo mi montros kaj diskutigos kigrade eblas krei esperantajn terminojn per tradukado de anglaj konceptoj kaj utiligado de korpuso, nelaste retkorpuso. Oni povas diri, ke la dua metodo helpas identigi ekzistantajn terminojn, dum la unua helpas krei novajn.

Eckhard Bick estas germana komputillingvisto vivanta en Danio, Li studis en Bonn, London kaj Århus kaj akiris diplomojn pri medicino, lingvistiko kaj Nordiaj lingvoj. Nuntempe li laboras por Suddana Universitato (Odense) kaj por sia propra firmao GrammarSoft, kreante porkomputilajn gramatikojn kaj leksikojn por la plej multaj ĝermanaj kaj romanidaj lingvoj, uzatajn i.a. en maŝintradukado (gramtrans.com), perreta instruado (beta.visl.sdu.dk) kaj korpusa lingvistiko (corp.hum.sdu.dk). Flankprofesie Eckhard Bick ankaŭ instruas akupunkturon kaj laboras kun esperantaj projektoj, kiel Lingvohelpilo kaj WikiTrans. Li publikigis plurajn vortarojn, librojn pri ĉina medicino, esperantajn tradukojn (Muminvalo) kaj eĉ esperantan ludon (GEO-ludo), kaj li estas ĉefaŭtoro de la esperanta lernolibro "Tesi la Testudo".

Marek Blahuš
Kelkaj interretaj projektoj rilataj al terminologio en Esperanto

Celo de la prezento estas konatigi la publikon kun kelkaj ekzemploj de aktualaj interretaj projektoj por konsideri ilian utilon por terminologia laboro - menciigoj projektoj kiel Komputeko, Reta PIV, STEB, Astronomia Terminaro. Pli detale traktota estas transformo de la papera Plena Ilustrita Vortaro (PIV) en elektronikan version, pri kio la prezentanto okupiĝas kadre de kunlaboro inter E@I kaj SAT.

Marek Blahuš estas magistro pri informadiko ĉe la Masaryk-Universitato en Brno (Ĉeĥio), en kies Centro de lingva edukado li nun laboras. Li studis ankaŭ ĉe la universitatoj de Leuven (Belgio) kaj Nancy (Francio) kaj specialiĝis pri komputila lingvistiko. En 2010-2011 li faris staĝon en la organizo E@I (Edukado ĉe Interreto), kies ĝenerala sekretario li estas, kaj regule kontribuas pri komputilaj temoj al kelkaj Esperanto-revuoj. En la jaro 2005 li partoprenis la refondon de Ĉeĥa Esperanto-Junularo, aktivus ankaŭ en TEJO kaj prezidis la LKK-n de la 65-a IJK okazinta en 2009 en Liberec'.